

ESPERANTISTO DE LA JARO 2014

MIREILLE GROSJEAN

PREZIDANTO DE ILEI

El "La Ondo de Esperanto" je 15-12-2014:

"La svisa emerita instruistino Mireille Grosjean, prezidantino de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) estas proklamita la **Esperantisto de la jaro 2014** pro la sukcesa agado en **Afriko**, interalie

pro la organizo de la **5a Afrika Esperanto-Kongreso**; pro la aktiva laboro en **ILEI**, kies 47an internacian konferencon en **Montevideo** ŝi gvidis en julio 2014; kaj pro la preparado de la **Tria Tutmonda Kolokvo pri Instruado de Esperanto** okazonta en 2015.



En ĉi tiu jaro 18 kandidatigantoj proponis 24 kandidatojn, al kiuj 18 elektantoj jene donis la voĉojn:

Mireille Grosjean 12 voĉoj

Stefan MacGill 7 voĉoj

Hori Jasuo 5 voĉoj

Heidi Goes 4 voĉoj

Kalle Kniivilä kaj Chuck Smith 3 voĉoj”